# STARTO

## N-ro 3/2025 (296)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO






## 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno
## 26 julio – 2 aŭgusto 2025

# ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz redakce@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

# Výbor ČES:

**Předseda:** Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz**:** (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

**Místopředseda:** Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

**Pokladník:** Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

**Člen výboru**: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

**Člen výboru:** Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

**Redaktor Starta:** Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:**
Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Facebook kaj Ipernity**
www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

# La 110-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRNO
## 26.7.-2.8.2025

Al la kongreso aliĝis pli ol mil kongresanoj el 63 landoj. Tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj. La kongreso okazis en la dua plej granda urbo de Ĉeĥio – Brno, situanta en la sudoriento. Gastigis ĝin Universitato de Mendel. La revuo Esperanto jam anticipe informis pri la urbo mem kaj pri Ĉeĥio ĝenerale.




Antaŭ la inaŭguro estis elektita nova estraro de UEA. Juna kaj talenta brazilano Fernando Maia fariĝis la nova prezidanto. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj".

En ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj pri la evento, okazis elsendoj en radio kaj televido. Akurate aperadis bone redaktita kongresa kuriero "Drako de Brno". Eblis fotiĝi ne nur kun la Majstro. Ĉe la inaŭguro estis nomumitaj novaj honoraj membroj.

Kiel jam sciate, programo de Universala kongreso estas tre abunda. Oni ĉiam devas elekti inter pluraj samtempaj programeroj tion, kio plej interesas. Tre riĉaj estis kulturaj programeroj kaj vesperaj prezentaĵoj.

Sukcesa estis la "Ĉinia tago", kiu okazas ĉiujare en la UK. La fotoekspozicion "Bela Esperanto, bela Ĉinio" admiris multaj samideanoj. Atenton kaptis ankaŭ la ekspozicio pri filatelo instalita ĉe la enirejo de la kongresejo. Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis futbalmatĉo kontraŭ lokuloj en kiu venkis nia teamo.



Dum la kongreso ĉeĥoj multe kontribuis al la programo per diversaj prelegoj. Ne mankis gustumado de ĉeĥaj bieroj kaj vizito de bierfabriko.

Interesatoj povis lerni la ĉeĥan lingvon, kiu estas tre komplika por eksterlandanoj, ekscii pri la ĉeĥa edukado, pri la ĉeĥa pedagogo kaj humanisto Komenio, kiu jam de la 17a jarcento proponis la ideon de la internacia lingvo por bona komunikado, pri la historio de E-muzeo en Svitavy, pri la trampa movado en Ĉeĥio, pri la naturo de Brno kaj pri ties ĉirkaŭaĵo. Bele prezentita estis la historio kaj la naturo de Ĉeĥio. Oni povis gustumi ne nur ĉeĥajn manĝaĵojn, sed ankaŭ la kulturon kaj folkloron, belajn pejzaĝojn dum multaj ekskursoj. Alloga estis vizito al la botanika ĝardeno, kaj fervojistoj kontribuis per informo pri planado konstrui novan, modernan stacidomon en Brno.

Okazis E-kursoj sub gvido de spertaj esperantistoj kaj KER-ekzamenoj. Interesis ankaŭ scienca programo, avantaĝoj

kaj malavantaĝoj de novaj teknologioj, artefarita intelekto, demenco kaj dulingvismo, estonteco de Esperanto, aŭtoraj duonhoroj kaj aliaj programeroj (ne eblas listigi ĉiujn). En la programo ne mankis belartaj konkursoj, UEA respondas, Amo seminario, IKU-prelegoj, Scienca Kafejo kaj la ŝatata aŭkcio. Agrable estis ripozi en ĉirkaŭo de la universitato, eĉ sur arbo.

Al la vesperaj programeroj kontribuis ankaŭ ĉeĥaj artistoj per koncerto de operkantisto Richard Haan, Jolana Smyčková kaj iliaj du knaboj kun la orkestro de la teatro Semafor. Muzikgrupo "Ŝafrda Memory Band" furoris en vespero per konataj kantoj. Teatro "Verda Banano" prezentis kabaredon "Kongresa Kafejo". La gejunula teatro "DOMA" el Svitavy prezentis teatraĵon "Lampiroj".

Inter esperantistaj artistoj koncertis Ĵele, Amira, Kaŝi, Tim Gallego, Martin kaj Bertilo, La Perdita Generacio, Duo Bemolo. Kajto kiel ĉiam ĝojigis kaj dancigis la publikon. Ĉi-foje Kim animis kongresan balon.

Diversa estis la oferto de duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Esperantistoj povis kun spertaj ĉiĉeronoj admiri plurajn kastelojn, belajn ĝardenojn, burgojn, grotojn, akvorezevujojn, bierfabrikon, Muzeon de Romaa Kulturo, aŭ vilaon Tugendhat. Aparta intereso ekestis pri la E-muzeo en Svitavy kaj pri la vespera stelobservejo en Brno kun klarigoj pri la somera ĉielo de nia fama astrofizikisto Amri Wandel.

Ĉifoje la nomŝildoj estis presitaj ambaŭflanke, kio estus imitinda en sekvaj kongresoj. Alia pozitiva oferto estis senpaga uzo de trafikrimedoj (krom taksioj). Bedaŭrinde mankis surpaperaj informoj pri Esperanto por scivolemaj preterpasantoj. En Francio oni solvas tion per disdono de etaj kalendaretoj kun koncizaj informoj pri E-gramatiko kun adreso por pli da informoj. Kelkaj salonoj por prelegantoj malgrandis.

Dum la internacia adiaŭa vespero prezentiĝis diversaj talentuloj el niaj vicoj. Ni povis spekti dancojn, kantojn, skeĉojn, muzikadon kaj ĥoruson sub gvido de Zdravka Bojĉeva.

Aparte notinda estas surekrana prezento de la raporto pri la kongresa semajno. Tiu resumo estas granda avantaĝo por rememoro pri la kongresaj aktivadoj. Ĉiuj esperantistoj certe travivis ne-forgeseblajn momentojn kaj renkontiĝojn kun malnovaj amikoj kaj novuloj.

Ĉeĥaj esperantistoj vere strebis organizi neforgeseblan kongreson kaj prezenti kiel eble plej bone la ĉeĥan landon. Ĉe la fino ili estis regalitaj per ladskatolaj bieroj kun simbolo de la kongreso.

La venontjara UK okazos en Aŭstrio en la urbo Graz, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto. Partoprenu ĝin!

*Liba Gabalda*



Transdono de la kongresa flago al Graz

*(Fernando Maia Jr., nova prezidanto de UEA, Jiří Tomeček, prezidanto de ĈEA, kaj Ewald Schick, prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio)*

# NOVA ESTRARO DE UEA (2025-2028)

La 26-an de julio 2025 la Komitato de UEA elektis novan estraron por la Asocio. La nova Estraro de UEA enoficiĝis la 27-an de julio, post la fino de la dua kunsido kadre de la ĝenerala kunveno de la Komitato, kiam ĝi akceptis la raportojn de la tiame eliranta antaŭa estraro. Kontaktoj de la nova Estraro disponeblas ĉe

https://uea.org/asocio/estraro

aŭ en la kolofono de la revuo Esperanto.

**Fernando Maia Jr.** (Prezidanto)



Kunordigo, Strategio kaj Statuta Reformo (kun helpo de Ó Riain kaj Kadar). Rilatoj kun TEJO (kun helpo de Kadar kaj Sabiyumva). Aktivula Maturigo (kun helpo de So). Ameriko (kun helpo de Ó Riain)

**Seán Ó Riain** (1-a Vicprezidanto)




Eksteraj Rilatoj (kun helpo de Lo Jacomo). Informado kaj Amikoj de Esperanto (kun helpo de Boytcheva, Lo Jacomo kaj Sabiyumva). Revuo Esperanto (kun helpo de Kadar kaj Arko). Eŭropo (kun helpo de Boytcheva kaj Lo Jacomo)

**So Jinsu** (2-a Vicprezidanto)



Kongresoj (kun helpo de Boytcheva kaj Maia). Azio kaj Oceanio (kun helpo de Arko)

**Aleks Kadar** (Ĝenerala Sekretario)



Administrado, Financoj, Centra Oficejo kaj Delegita Reto (kun helpo de Maia kaj Sabiyumva). Faka Agado (kun helpo de Lo Jacomo kaj Raveloharison). Reta Agado (kun helpo de Maia)

**Gong Xiaofeng Arko**



Instruado, Rilatoj kun ILEI (kun helpo de Raveloharison). Ekzamenoj, Rilatoj kun Edukado.net (kun helpo de Maia). Rilatoj kun la Akademio de Esperanto (kun helpo de Lo Jacomo). Bibliotekoj, Esploro kaj Dokumentado, Rilatoj kun CED (kun helpo de Boytcheva kaj Ó Riain)

**Zdravka Boytcheva**



Kulturo (kun helpo de Ó Riain kaj Sabiyumva). Eldona Agado (kun helpo de Maia)

**Miora Raveloharison**



Universitata Agado (kun helpo de Arko). Virina Agado (kun helpo de Boytcheva kaj Arko). Afriko (kun helpo de Sabiyumva)

**Jeremie Sabiyumva**



Landa Agado (kun helpo de Kadar). Meza Oriento kaj Norda Afriko (kun helpo de Maia)

**François Lo Jacomo**



Scienca Agado (kun helpo de Arko, Raveloharison kaj Maia). Esperanto-centro kaj ZEO-j (kun helpo de Boytcheva kaj Kadar). Ĝemelaj Urboj (kun helpo de Ó Riain kaj Raveloharison). Terminologio (kun helpo de Ó Riain kaj Maia)


# Novaj Honoraj Membroj de UEA

Dum sia unua kunsido en Brno la Komitato elektis 10 novajn Honorajn Membrojn:

■ el Brazilo **Paulo Sérgio Viana**
■ el Ĉeĥio **Miroslav “Mirek” Malovec**;
■ el Italio **Michela Lipari**;
■ el Nov-Zelando kaj Hungario **Stefan MacGill;**
■ el Aŭstralio **Trevor Steele**;
■ el Koreio **Lee Jungkee**;
■ el Svislando **Mirejo Grosjean**;
■ el Hungario kaj Germanio **Zsófia Kóródy**;
■ kaj *in memoriam* el Ĉinio **Wang Chongfang** kaj **Wei Yida “Vejdo”**.

# Premio Deguĉi 2025 al Mónika Molnár

La premio Deguĉi por 2025 estas aljuĝita al Mónika Molnár (Hungario / Svislando).



Mónika Molnár naskiĝis la 28-an de julio 1975 en Hungario kaj loĝas ekde 2003 en Svislando. Diplomita instruisto pri informadiko, italaj lingvo kaj literaturo, kino, esperantologio kaj interlingvistiko. De jaroj laboras en malgranda fondaĵa lernejo "La Granda Ursino" en La Chaŭ-de-Fonds (www.grande-ourse.ch), kie ŝi instruas matematikon, sciencojn, manlaborojn kaj Esperanton al 6-15 jaraj gelernantoj.

Ŝi eklernis Esperanton en 1993 kaj ekde tiam okupiĝas pri la lingvo diversmaniere kaj diversterene, membras en ILEI /1994/, UEA /1995/, HEJ (Hungara E-Junularo) /1994/, SES (Svisa Esperanto Societo), IRE (Internacia Rajtigita Ekzamenantaro) /2005/, IEK (Internacia Ekzamena Komisiono) /2007/ kaj estas rajtigita ekzamenanto laŭ la KER-sistemo /2009/.

Plenumis arkiv-laborojn en/por la biblioteko de CDELI en La Chaŭ-de-Fonds, kunlaboris kaj ilustris la librojn ”Okulo” kaj ”Okulo-Gvidilo” (E-lernolibro por infanoj kaj gvidlibro por instruistoj, ILEI, Budapeŝto), kunlaboras (ilustrado, rubrik-redaktado) en Juna Amiko (E-revuo por lernejanoj kaj komencantoj, ILEI), organizis esperantajn lingvokursojn, kunlaboras ĉe edukado.net (paĝaro por Esperanto-instruistoj, kursorganizantoj kaj memlernantoj), kadre de IRE (Internacia Rajtigita Ekzamenantaro, ILEI) preparis ILEI-ekzamenojn, kunlaboris pri KER-ekzamenoj.

Ŝi gvidis kursojn en/pri Esperanto, itala kaj hungara lingvoj en pluraj landoj, ekzamenas laŭ ILEI- aŭ KER-sistemoj kaj ekde 2003 instruas interalie Esperanton en la lernejo "La Granda Ursino" kaj korespondigas siajn gelernantojn kun diverslandaj samaĝuloj. La 15-an de decembro 2012 Mónika Molnár eniris la panteonon de la retejo edukado.net.

Ŝia laboro por edukado de infanoj cele al mondcivitaneco per Esperanto plene meritigas ŝin por la Premio Deguĉi 2025. UEA varme gratulas al Mónika kaj dankas ŝin pro tiu laboro.

*GK de UEA 1245*

# 7 diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj aljuĝitaj en Brno

En la Solena Fermo de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno (Burno) estis anoncita la disdono de 6 diplomoj pri Elstara Agado kaj 1 pri Elstara Arta Agado por la jaro 2025.

## Elstara Agado

**Nisinaga Atusi “Acero”** (Japanio) pro elstara agado kiel kunordiganto de la Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Movado (KAOEM), interalie pro efika subteno al la okazigo de 10-a Azia-Oceania Kongreso (AOK), kaj pro la longtempa agado por Esperanto en Japanio, interalie kiel vicprezidanto de Japana E-Instituto.

**Henriel Fidilalao** (Madagaskaro) pro la aktiva laboro pri disvastigo de Esperanto en Madagaskaro, interalie per prizorgado de la reta "Aminda Radio Esperanto", kiu elsendiĝis jam 153-foje, kaj la monata revuo "Panoramo de la Granda Insulo".

**John (Xiaolong) Huang** (Kanado) pro la elstara aktivado kadre de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF), kiel prezidanto de IKEF Nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", organizanto de ĉiu-dimanĉa reta kunveno. Krome li estas oficiala fotisto de UK ekde 2022.

**Françoise “Fransoazo” Noireau** (Francio) pro la elstara agado pri instruado de Esperanto en Afriko per la reto (Vacapo) kaj kunordigo de 16 instruistoj, plimulte afrikaj, kadre de kunlaboro kun la Universitato Espero en Barako, D R. Kongo

**Libuše Dvořáková** (Ĉeĥio) pro longjara prizorgado de la Esperanto-muzeo en Svitavy.

**Věra Barandovská-Frank** (Germanio/ Ĉeĥio), ĉi-jara rektoro de Internacia Kongresa Universitato (IKU), pro la multjara lingvistika agado kunlabore kun la edzo Helmar Frank pri Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), longtempa instruado en Poznano kaj verkado de ĉ. 130 sciencaj publikaĵoj.

## Elstara Arta Agado

**Bobelarto** (Hungario/Kanado) pro la elstara kontribuo al la literatura agado en Esperanto, interalie per organizado de Internacia Novel-Konkurso (INK), literatura duonmaratono, verksesioj kaj legosalonoj.

# Akcepto en la urbodomo

*Marde la 29-an de julio 2025 la invititaj kongresanoj estis akceptitaj en la urbodomo de Brno*





## REZOLUCIO DE LA 110-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BRNO

Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion:

Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingo de paco kaj konfido inter la popoloj;

Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj;

Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas i.a. pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo;

Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio;

Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj kultura diverseco;

Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj:

■ reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj

■ labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj;

Ni konkludas, ke:

■ reciproka konfido povas kontribui al harmonia, respektoplena, sekura kaj interkultura socia etoso kaj redukti la disdividajn fortojn en la socio;

■ respekto por lokaj kulturoj portataj de lokaj lingvoj tiel plifirmiĝas, kaj samtempe socia kohero por paco fortiĝas;

■ tiel la novaj komunikrimedoj helpos konstrui pontojn inter la popoloj, kaj la tendenco al bariloj kaj polusiĝo malfortiĝos.

Brno, 2025-08-01
*GK 1247*

## Futbala matĉo



inter la loka kaj kongresa teamoj okazis ĵaŭde.

# Kongresa kuriero

nomiĝis Drako de Brno, aperis 7 numeroj, kiujn redaktis Miroslav Malovec kun helpo de Marek Blahuš kiel ne nur provleganto. Desegnon de la drako kreis Vlasta Pištíková. Por T-ĉemizoj ŝi adaptis la bildon kun helpo de Artefarita Intelekto, Jan Šebetovský kaj Petr Javorík.




Elŝuteblaj ĉe la retejo de UEA.
https://uea.org/kongresoj/UK/2025




# La kongreso en tramoj




En pluraj tramoj de Brno aperis afiŝo reklamanta la kongreson. Speciala reklamo estis fontano antaŭ Janáček-treatro, kies akvo desegnis vorton Esperanto.

# La kongreso en televido

La 20-an de julio 2025 estis invitita al televida interparolo pri la kongreso Tomáš Břicháček kaj la 30-an de julio Marek Blahuš.




# Kongresa Libroservo



prezentis kaj disvedis grandan kvanton da libroj.


# Koncertoj ĉe UK



Duopo Kajto koncertis plurfoje.



En la kastela korto de Špilberk koncertis kaj dancis Zimbalongrupo de Jožka Imrich



kaj kantis operkantistino de Nacia Teatro en Praha Vanda Šípová ariojn el la esperantlingva opero Sternenhoch de Ivan Acher kaj el Najado de A. Dvořák.



Marde sin prezentis Šafrda Memory Band kantante esperante.



Geedzoj Richard Haan (Nacia Teatro) kaj Jolana Haan Smyčková (teatro Semafor) kun siaj filoj Richard (12) kaj Kristián (10) riĉigis la ĵaŭdan programon.



Vendrede en Internacia Arta Vespero sin prezentis talentaj unuopuloj kaj fine la kongresa ĥoro, kiu trejnis dum la tuta semajno.



# 4-a Interkultura Novel-Konkurso

**Sperta kategorio**

1. Zakhar Serebrov – Rusio: *Kie vojoj renkontiĝas*
2. Jorge Rafael Nogueras – Portoriko: *La ĉioscieco de OV-GPT*
3. Ljudmila Shebella – Estonio: *Lasta lavo*
4. Yin Jiaxin – Ĉinio: *Olda Fan kaj la roboto-edzino*
5. Mahin Rad – Irano: *Ruĝa saŭco sur blua ĉemizo*

**Komencanta kategorio**

1. Javad Eskandari Mayvan – Irano: *Kunulo*
2. Elisabetta Antichi – Italio: *Dankon, Komputilo*
3. Mikhail Reztsov – Rusio: *Malsatklingokuristo*
4. Olena Klymovskykh – Ukrainio: *Generatoro de falsa vivo*
5. Stefan Grotz – Germanio: *Nenio pli gravas*

Ĉiuj detaloj troviĝas ĉe: bobelarto.ink/konkurso/

# Belartaj Konkursoj 2025

## POEZIO

**1.** *Al mia unua instruistino nun 90-jara...* de Benoît Philippe el Germanio.

**2.** *Amara bukedo* de Nicolau Dols el Hispanio.

**3.** *Aŭdu* de Benoît Philippe el Germanio.

**Honora mencio:** *La fia komedio* kaj *Buĉado* de Gonçalo Neves el Portugalio.

**Honora mencio:** *Poacoj sur roko* de Choe Taesok el Litovio/Koreio.

## PROZO

**1.** *Plagiato* de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko kaj "Ridindaj amaferoj" de Debra Hamel el Usono.

**2.** *La malfacila vivo dum la milito* de Jean de Dieu Kikako el D.R. Kongo.

**3.** *Kiam flugilo rompiĝas* de Wei Yubin el Ĉinio.

## MIKRONOVELO

**1.** (premio Paula Adúriz): *"¡"* de Steven Cybulski el Usono.

**2.** *Mortigo de Mnemozino* de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

**3.** *Kreema Infano* de Lurdes Oliveira el Portugalio kaj *Ne krokodilu!* de Debra Hamel el Usono.

## BRANĈO TEATRAĴO

**1.** *Civilizita konversacio* de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko.

**2.** *Ara* de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

**3.** *Dominiko Orban en la infero* de Laimundas Abromas el Litovio.

**Honora mencio:** *Mi estas Neniulo* de Ralph Glomp el Germanio.

## MONOLOGO AŬ SKEĈO

**1.** (premio María Cuevas): *Bopatrino – superheroo, surhavanta antaŭtukon* de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

**2.** kaj **3.** ne aljuĝitaj

## INFANLIBRO DE LA JARO

La Eldonejo "ZIRIA", pro la verko *Vivo* de Roberto Pérez-Franco, ilustrita de Margarita Cubino kaj tradukita de Norberto Díaz Guevara.

## ESEO

**1.** (premio Luigi Minnaja): *Semantika potenco de Esperanto: de kombineblo al signifo* de Toni Espinosa el Hispanio.

**2. kaj 3.** ne aljuĝitaj.

## KANTOTEKSTO

**1.** *Ploras la ĉiel'* de Petro Palivoda el Ukrainio.

**2.** *Amhistorio* de Petro Palivoda el Ukrainio.

**3.** *Nedeca tango* kaj *Ĝuu la vivon* de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la BK de UEA

# Sciencaj konkursoj PIRLOT kaj POWER

**Premio Pirlot** (sciencaj libroj) estis:

**1.** *Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj*, A. Wandel kaj C. Spinola;

**2.** la IKU-libro 2025, red. A. Striganova, D. Ŝevĉenko kaj A. Wandel;

**3.** *La Rivoluoj de la Ĉielaj Korpoj*, trad. R. Fössmeier kaj H.-M. Maitzen.

**Premio Powe**r (longa scienca prelego):

**1.** *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado*, Amri Wandel;

**2.** *La ambigueco de Nombroinformo*, Ekaterina Bebenina;

**3.** *Multlingva temvortaro helpata per AI*, Ilona Koutny.

**Premio Power** (mallonga scienca prelego):

**1.** *Gergor Mendel*, Judith Jackson;

**2.** *Knabeto Savita de Auschvitz*, Thomas Bormann;

**3.** *Arkivistiko kaj Esperanto*, Ruben Fernandez.

# IKU-prelegoj kaj AIS-atestiloj por ekzamenitoj

Dum la 78-a IKU okazis 19 prelegoj: 8 IKU-prelegoj, kun 3 daŭrigaj prelegoj de AIS, kaj 8 prelegoj de la Scienca Kafejo. Ĉiuj prelegoj estis registritaj. Dum la Scienca Forumo estis publike disdonitaj la atestiloj por la du AIS-kursoj, en kiuj okazis ekzamenoj: tri atestiloj en la kurso *La ambigueco de Nombroinformo* kaj 31 atestiloj en la kurso *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado*.

# Sciencaj aŭkciitaj objektoj

En la Aŭkcio de la 110-a UK estis pluraj aĵoj rilataj al sciencaj verkoj kaj rezultoj. Kiel ĉiam estis aŭkciita la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj ĉeestantaj prelegintoj. Aldone unuafoje estis aŭkciitaj la gajnintaj libroj de la Premio Pirlot kaj la atestiloj de la Premio Power. Fine AIS ofertis historian kravaton de la akademio.

# Faka Forumo

Ĵaŭde posttagmeze prezentis sin pli ol 30 fakaj asocioj dum la Faka Forumo. La forumo daŭris unu horon kaj duonon kaj estis registrita. Interalie oni diskutis pri la planita Almanako de UEA (Kadar) kaj pri la revigligo de ISAE (Wandel).

# Stelobservado

Nekutima elemento de la scienca programo de la UK estis la ekskurso E8, okazinta merkrede vespere, en la nova planetario de Brno. La 140 partoprenintoj ĝuis specialan 40-minutan 3-D-programon *La Universo per ĉiuj sensoj*, kun E-tradukado zorge preparita de la Loka Kongresa Komitato, kaj prelegon pri la historio de astronomio fare de Wandel, kiu sekve gvidis virtualan viziton de la nokta ĉielo helpe de la plej novaj rimedoj de la planetario.

# Esperantologia Konferenco

La 47-an Esperantologian Konferencon dum la 110-a UK, organizis Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, nome de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Fakuloj kaj interesatoj pri esperantologio, interlingvistiko, lingvosciencoj kaj la mondaj lingvaj problemoj kunvenis la tutan kongresan ĵaŭdon. Oni aŭskultis ok altnivelajn prelegojn pri arkivoj de esperantaĵoj, uzo de Esperanto en la familio kaj en la mondo en epoko de artefarita intelekto, kontaktlingvistiko kaj propedeŭtiko rilate al Esperanto kaj la gramatiko kaj la interna ideo de la lingvo. Dum la konferenco regis bona etoso, ankaŭ dank'al la kafopaŭzoj, inter la ĉ. 50 partoprenantoj, multaj el ili tre aktivaj per demandoj kaj proponoj. La konferencon fermis ĝenerala diskuto pri interlingvistiko kaj mondaj lingvaj problemoj. Oni ankaŭ pritraktis la statuson kaj futurajn eblecojn de interlingvistiko en universitatoj ĉirkaŭ la mondo.

# Ferma parolado de Fernando Maia Jr.

Estimataj,

Ni nun alvenas al la fermo de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Sed kio fakte fermiĝas? Ĉiam post niaj renkontiĝoj, mi havas la impreson, ke efektive io nova malfermiĝas: malfermiĝas novaj vojoj; ampleksiĝas niaj mensoj, niaj koroj kaj niaj konscioj; novaj pontoj kreiĝas...

La temo de tiu ĉi kongreso estis "Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj". Iusence niaj lingvoj, inter ili kompreneeble Esperanto, estas teknologio. Kaj kiel ili efikos por pli bona homa rilato, tio dependos de nia konscio pri tio, ke ni ne estas solaj; ke ni estas dependaj unuj de la aliaj; kaj ke por pli bona kunekzisto kaj kunlaboro ni bezonas vivi kaj agi solidare.

UEA naskiĝis el tiu ideo: ke ni ne estas individuoj izolitaj, sed ke ni bezonas unuj la aliajn; ke ni ekzistas kolektive kaj komune kaj ke pro tio, ke Esperanto estas nia lingvo, por ni ne estas limoj kaj baroj por kunlaboro, se ni ne ĉesos agadi solidare. Konscio pri tio estas la forto mem de nia espero pri pli bona mondo.

En tiu ĉi salono sidas homoj el dekoj da landoj, kun diversaj spertoj, kulturoj, aĝoj kaj perspektivoj. En nia diverseco, en nia bela diverseco, karaj, ni trovis tamen plene funkciantan komunan neŭtralan lingvon. Mi proponas, ke vi nun rigardu al tiuj, kiuj estas apud vi. Rigardu konscie. Apud vi estas homoj, samideanoj, fratoj kaj fratinoj de pli granda familio. Mi deziras, ke ni ĉiuj vere konsciu, ke ni ne estas solaj; ke ĉiuj ni povu fieri pri tio, kion atingis niaj antaŭuloj kaj kion nun ni antaŭenigas. Tio estas frukto de kunlaboro trans la epokoj kaj la spacoj, frukto de solidareco – sed ankaŭ frukto de kuraĝo.

Niaj antaŭuloj devis multe batali – kaj same ni devas daŭre batali. Mi pensas tamen, ke ni povas ĉesi paroli pri la fina venko de Esperanto. La kialo de tiu mia penso estas, ke por mi Esperanto jam venkis. Ĉiuj ni kaj tiu ĉi kongreso estas mem belega pruvo de tio. Sed kompreneble ni deziras, ke Esperanto povu plu prosperi. Tamen pro tio ni ankaŭ bezonas batali por aliaj ŝanĝoj en la mondo... Efektive nur en mondo pli egaleca, pli justa kaj pli solidara Esperanto povos plene prosperi.

Se do ne plu paroli pri la fina venko de Esperanto, ĉar Esperanto jam venkis, ni kuraĝu komenci paroli pri la fina venko de la Homaro. Kaj ni komprenu la potencon de Esperanto por tio, ne nur kiel lingvo, sed kiel valoro, por kontribuo al mondo kun pli da konfido kaj paco. Kun pli da amo finfine.

Estimataj, karaj miaj, mi esperas, ke vi revenos hejmen kun pli forta sento, ke vi estas parto de monda familio. Tiu konscio, ke ni ne estas solaj kaj ke ni estas dependaj unuj de la aliaj, nepre devas esti en socio, kiu agu pli kolektive kaj solidare. Mi dankas elkore pro nia renkontiĝo...

Mi esperas, ke vi revenos hejmen pli feliĉaj: tiel feliĉaj kiel mi nun estas pro miaj renkontiĝoj kun ĉiu el vi, pro nia UK, pro nia amikeco – pro Esperanto. Koran dankon, miaj karaj, koran dankon!

# Novaj arbo kaj ŝtono

La arbo estis senvualigita lunde la 28-an de julio 2025 en la botanika ĝardeno de la universitato.




Estis elektita arbo, kies folioj similas al kvinpinta stelo.



La kaŭranto estas botanikisto, kies avino estis esperantistino.

# Pardubice

**la 16-an de aŭgusto 2025**

La ŝtono estis instalita antaŭ Esperanto-arbo en Pardubice en *Bubeníkovy sady* (parko Bubeník) okaze de datreveno de fondiĝo de loka Esperanto-klubo.




Post solena parolado kaj kantado la partoprenantoj vizitis legoĉambron de Librocentro Vokolků



kaj amike kunsidis.



# Esperanto-Muzeo en Svitavy ĝuis eksterlandajn vizitojn

Kun la prokisimiĝanta Universala Kongreso de Esperanto en Brno kreskis intereso pri la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Ankoraŭ antaŭ la kongreso ni bonvenigis s-ron Kokou Sagbadjelou el Togolando. Li vizitis Svitavy jam en la jaro 1999, kiam la muzeo ankoraŭ ne ekzistis. Tiam ni vizitis la Urban Muzeon kaj Galerion. Nun ni rememoris la pasintan viziton kaj plezure fieris pri la Esperanto-Muzeo. Kokou dediĉis al la muzeo statueton de afrika virino, kiu estis tuj ekspoziciita.




Pri la vizito de Svitavy montris intereson ankaŭ Lars Sözüer, kiu gvidis „BEMI-karavanon“ el Prago al Brno. Esperantistoj el Germanio, Aŭstrio kaj Nederlando tranoktis en nia ĝardeno kaj niaj klubaninoj uzis okazon por interbabilado.

Ankoraŭ antaŭ la alveno de biciklantoj mi akompanis tra la muzeo s-inon Sachiko Negishi el Japanio, kiu bone konas nian multjaran amikinon Sachiko Hayashi, kiu devis lastmomente nuligi sian partoprenon en la kongreso.

La plej granda vizito efektiviĝis enkadre de la UK-ekskurso al Svitavy kaj Litomyšl. Estis por ni granda honoro bonvenigi en la muzeo la nove elektitan UEA-prezidanton Fernando Maia Jr. Plie ni haltis ĉe tri Esperanto-arboj kaj ĉe kelkaj memorindaĵoj de la placo de Paco. La klubo preparis por la ekskursantoj suvenirojn. Surprizis nin bele ornamita saloneto por tagmanĝo en la restoracio Astra. Post vizito de la kastelo Litomyšl la prezidanto havis mallongan rememoran paroladon super la tombo de la verkisto Karel Píč, dankante lin pro lia kontribuo al la esperantlingva literaturo kaj metis bukedon da rozoj sur lian tombon.



El la kongreso venis al ni al Svitavy niaj finnaj amikoj frunte kun s-ino Aini Vääräniemi, kiu estas mia multjara korespondantino. En la muzeo ni kunvenis ankaŭ kun Anjo Ahlstedt, kiu edziniĝis al finna esperantisto kaj multajn jarojn tie vivis. Ŝi konvinkiĝis, ke ŝi ne forgesis la finnan lingvon.

Post la kongreso venis viziti nin Aleksandra Watanuki, kiu vivas en Japanio kaj laboras en informejo de Japana Esperanto-Instituto. Al la muzeo ŝi donacis sian libron.

La kongreson memorigos al ni multnombraj fotoj kaj videoj, kiujn registris nederlanda biciklanto Guilio Dioguardi.

*Libuše Dvořáková*

# Riĉa prelega programo dum UK

## Kongresa temo

### Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj

**Bengt-Arne Wickström**: Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de novaj teknologioj

**Rakoen Maertens**: La psikologio de falsaj novaĵoj: Kiel protekti sin kontraŭ la influo de misinformoj

**Kunio Ooki**: Esperanto kaj teknologio

## Prelegoj pri Ĉeĥio

**Oldřich Arnošt Fischer:** Ĉeĥio – kongreslando – historio kaj naturo

**Miroslav Malovec:** Ĉeĥio – kongreslando – Esperanto-movado

**Věra Barandovská-Frank:** Komenio, ĉeĥa humanisto

**Vít Guiglielmo Mišurec:** Ĉeĥa biero: koncepto, kiu konkeris la mondon



**Aleš Tomeček:** Turistaj gvidmarkoj

**Libuše Dvořáková:** Historio de la Esperanto-Muzeo en Svitavy

**Vladimír Türk:** Historio de trampa movado en Ĉeĥio

**Petra Mertová, Mirka Tomečková:** Naciaj kostumoj

**Oldřich Arnošt Fischer:** Naturo de Brno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

**Martin Sedlák:** Kurso de la ĉeĥa lingvo

## Kleriga lundo

**Georg Hennemann:** Vi devas ŝanĝi vian vivon – Preskaŭ forgesata imperativo de la homaro

**Katalin Kováts, Sylvain Lelarge:** Fakul-anguloj

**MORI Hitosi:** Ekkonu aŭ rekonu GOon – unu el la plej tradiciaj kaj internaciaj intelektaj tabulludoj

**Yves Nevelsteen:** Kial kaj kiel vaste diskonigi Esperanto-eventojn per Eventa Servo de UEA

**YU Jianchao (Terana):** La Monda Heredaĵo – Printempa Festo

**Marija Belošević:** Du Franciskoj: dissemantoj de la paco kaj bono

**Petr Chrdle:** Petr Ginz (1928, Prago – 1944, Aŭŝvico)

**Monika Molnar:** La plezuro desegni

**Marta Ruzza:** Demenco kaj Dulingvismo

**Bernhard Tuider:** La Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko

**Nina Danylyuk, Eŭheno Kovtonjuk:** "Valoraĵoj senlime uzeblaj" (La vivo kaj verkoj de Vasil Eroŝenko kiel ekzemplo de universalaj valoroj kaj interkultura dialogo: al la 135-a datreveno de la naskiĝo)

**Ivan Garcia:** Mono de Utopio: La Esperantistaj Alternativaj Valutoj de Hieraŭ, Hodiaŭ kaj Morgaŭ

**Josef Kalčík:** Merkatika funelo – kio ĝi estas kaj kiel esti bona advokato de Esperanto

**Katalin Kováts:** Informado kaj trejnado pri la KER-ekzamenoj

**Larysa Osadchuk, Alain Delmotte:** Origamio en pedagogio kaj instruado de Esperanto

**Éva Tófalvy:** La mondo en 2082 laŭ Sándor Szathmári

# Tago de Lernado / AMO-seminario

**Mireille Grosjean**: Ĉu ĉiuj esperantistoj estas efikaj 'pontoj'?
**Fernando Maia Jr**: La potenco de kunlaboro en edukado por paco kaj konfido
**Duncan Charters**: Kiel profiti teknologion por paccelaj kulturaj interŝanĝoj
**Bernhard Tuider**: Diĝitaj dokumentoj el la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko
**Libuše Hýblová**: Ĉeha eduksistemo
**Ahmad Mamdoohi**: Esperanto kaj AI: pontoj al la paca mondo
**Stela Besenyei-Merger**: Radikala Tenero – retaj babiladoj por interkultura lernado kaj internacia interkompreniĝo
**Alessandra Madella**: Kernaj Konceptoj de Komunikado
**Jeremie Sabiyumva**: Kontribuo de Esperanto kaj teknologio en informado, kazo de Afriko

# Aŭtora Duonhoro

**Ilona Koutny, Miroslav Malovec, Milan Kolka**: Angla-Esperanta-Ĉeĥa temvortaro
Aŭtora duonhoro kun **Anna Löwenstein**



Aŭtora Duonhoro kun **Amri Wandel**
**Petr Chrdle:** Mia vivo kun Esperanto
**Adjévi Adjé:** Afrikaj Proverboj
**Marija Belošević:** "Kontraŭ la milito – la kuraĝo konstrui la pacon" Papo Francisko
**Éva Tófalvy:** Romano "La liberiĝo"
**Pierre Grollemund:** Rekonstruado de Nia Damo de Parizo

# Prezentoj ĝeneralaj

**Zsófia Kóródy:** Historio kaj nuntempo de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo
**Mireille Grosjean:** "Voĉoj de la Senvoĉuloj" libro pri homaj rajtoj en Norda Koreio
**Michela Lipari kaj Brian Moon:** Renato, ĉies amiko: omaĝe kaj memore
**Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte:** Lernu Esperanton per origamio – kurso
**Pavla Dvořáková:** Surspure de doktoro Zamenhof en Pollando



**Mireille Grosjean:** Kunlaboro inter Ĉeĥoj kaj Svisoj sur la limo inter la du koreaj ŝtatoj



**Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte:** Ateliero de origamio
**Alfons Tur i Garcia:** Prezento de la Premio por abiturientaj tezoj pri Esperanto en Katalunio

## Kongresa universitato



havis riĉan proponon da prelegoj: La iluzio de precizeco: kompreni kaj akcepti la ambiguecon de nombra informo ■ Multlingva reta temvortaro helpata per artefarita intelekto ■ La teknologio de Spacvojaĝado kaj esplorado: de la Internacia Spacstacio ĝis James Webb ■ Antonín Bartoněk: el Brno al misteroj de la pragreka civilizo ■ Pri musoj kaj homoj: Behaviorismo en brutalisma arĥitekturo ■ La infanlibroj kiuj sin turnis al plenkreskuloj ■ La Konga Sendependeco kaj Historio de Kongo ■ Viruso Ebola ■ La revolucia vidpunkto de Jean-Jacques Rousseau pri lingvo kaj politiko




## Scienca kafejo

Lumo kaj poluado de atmosfero ■ Burno kaj la Dua Mondmilito: knabeto savita de Auschwitz ■ La Universala Deklaracio pri Arĥivoj: inter arĥivistiko por esperantistoj kaj esperantismo por arĥivistoj ■ Resonanco, kaj ĝiaj uzoj en la ĉiutaga vivo ■ Longdaŭrismo, ĉu amika, ĉu danĝera ■ Virinoj kaj kriminaleco en Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento (1876-1892) ■ Vegetaĵoj ne vegetas — Kiel plantoj sentas kaj moviĝas ■ Gregor Johann Mendel (Řehoř Jan Mendel) (1822 – 1884)

## Esperantologia konferenco

**Bengt-Arne Wickström:** Informilo por interlingvistoj, Kolektoj de esperant-lingvaj tekstoj

**Bernhard Tuider:** La arkivo de Universala Esperanto-Asocio

**Yevgenya Amis**, **Emmanuel Delille, Pascal Dubourg Glatigny, Irène Ellenberger, kaj Gabriel Labrie:** La kajeroj de Henri Ellenberger: unika korpuso en Esperanto

**Eszter «Stela» Besenyei-Merger:** Esperanto kiel familia lingvo


**Ilona Koutny:** Ĉu necesas plurlingvismo kaj Esperanto en la epoko de AI?

**Ekaterina V. Bebenina:** Kiel esti aŭdata en mondo de atingoj, mono kaj metrikoj: la propedeŭtiko kiel valoro

**Alessandra Madella:** La Esperanto-eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton en la debatoj pri edukado

**Philippe Planchon:** La fenomeno de duobligo en esperanto laŭ lingvistika vidpunkto

**Humphrey Tonkin:** Interlingvistiko kaj la koncepto de espero



# 3-a Teplica renkontiĝo

La 5-a de aŭgusto, okazis la 3-a "Teplica renkontiĝo". Tiel kunvenis ĉirkaŭ 20 esperantistoj, kun honora partopreno de la nova prezidantino de Internacia Fervojista Esperanto Federacio sinjorino Andrea Švubová. Ĉi-jare, la ĉefa celo de la renkontiĝo estis la vizito de la "Aragonitaj" grotoj en la banloko Teplice nad Bečvou. La rendevuo matene estis en la stacidomo de Hranice na Moravě, ĉar homoj venis el pluraj urboj el Ĉeĥio. Ni, per urba buso, veturis ĝis la banloka domo Moravan. Tie ni piediris kelkajn centojn da metroj ĝis la enirejo de la grotoj. La vizito daŭras ĉirkaŭ unu horon, kun klarigoj de gvidantino. Poste ni tagmanĝis en restoracio de la banloko.



Sekve ni piediris supren al Zbrašov kie, en la sama biera ĝardeno kiel pasintjare, ĉirkaŭ tablo, refreŝiĝante kun glaso en la mano, ni povis babili. Oni povis respondi la demandojn de kvizo preparita de Ladislav Hakl, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti. La etoso estis agrabla. Oni grupiĝis por komuna fotado. La tempo pasis kaj iam estis tempo por iom post iom rehejmiĝi. Ni travivis agrablan tagon.

*Hubert Payrouty*



*Kelkaj el ĉeĥaj prelegantoj dum UK: Ladislav Hakl kaj Ladislav Kovář, Libuše Hýblová, Pavla Dvořáková, Oldřich Arnošt Fischer.*

# ĈEĤAJ SPUROJ EN AFRIKO (ankaŭ miaj)

Parto unua

Mi estas certa, ke nia leganto jam scivolis vidi, kiu etas la aŭtoro tiom avida je la atento, ke li?/ŝi? arogas starigi sin mem apud famaj personuloj, pri kiuj oni volas skribi… Certe vi jam rigardis, do ni komencu pri tiuj vere la plej famaj.

Mi ne dubas, ke ĉiuj tuj pripensas – Emil HOLUB… Sed kiu el ni scias, ke li ne estis la unua. Por ni, Eŭropanoj, Afriko komenciĝas en MAROKO. Por la ĉeĥa interesiĝanto pri Afriko, tio komenciĝas per la libro de aŭtoro, kiu vivis en la tempo de Kolumbo kaj kiun historio nomas „Ferdinando Moravia“ (Ferdinand Moravský). Lia libro estas, ni diru, „manlibro/informlibro“ por maristoj, kiuj navigis preter Maroko-marbordoj. Sed ĝi estas utila ankaŭ por zoologoj, botanikistoj kaj etnografoj de koncernaj regionoj. Ĉu li mem estis en la j. 1502 en Maroko, aŭ la informojn akiris nur danke al sia preterborda navigado, ne estas sciate. La manuskripto de lia libro estas deponita en la Biblioteko en Munkeno.

Nu bone – tio estas la unua dokumentita fakto „de ĉehaj spuroj al Afriko.“ Ne imagebla estas la fakto, ke iu loĝanto el tiaj malproksimoj, kie situas Afriko, Arabio, kaj, kaj, kaj… povus atingi nian landon – antaŭ pli ol mil jaroj (jes, 1000). Ĉu ni povus imagi nian ekziston, se en la j. 937 ne estus skribinta la araba (Jemen-a) komercisto Ibrahim Ibn Jakob, ke li vizitis „la urbon, kies nomo estas PRAGO.“ Ĉu entute oni povas imagi, ke tie ĉi estis kultivita lando??? (Lia skribaĵo estis eldonita en la 11-a jarcento).

Poste historio mencias, ke sultano petis la imperiestron Maxmilian pri armea helpo kontraŭ la maroka ĉefurbo (tiam Fez-o). Ĉu okazis – ne estas dokumentite…

Poste la „ekstravaganca imperiestro“ Rudolfo la 2-a elsendis en Maroko-n 13-membran delegitaron. La ekspedicio daŭris 3 semajnojn, estris ĝin la diplomato (kaj aventuristo) Antony Sherley. La celoj ne estis nur natursciencaj (ja la ĉefa intereso de la imperiestro), sed ankaŭ diplomataj. A.S. en diplomacio elstaris, li jam estis ambasadoro en Persio; onidire li estis tiom memkonscia (aroga), ke en la sultan-salonegon li eniris sur sia ĉevalo… En la ekspedicio estis ankaŭ nobeloj, kiuj por si aĉetis famajn arabajn stalonojn (virĉevaloj por bredado).

Plua vizitanto de Maroko (de ĉeĥa provenienco) estis Václav HOLLAR (1607-1677), gravuristo, kiu en servoj de la angla reĝo Karolo la Dua kiel kartografo faris multajn vedutojn (urbobildojn) de la fortikaĵo Tanger (kiun la brita reĝa dinastio ricevis herede).

„Mistera aventuristo“ Enrique Stanko VRÁZ. Li vizitis Maroko-n en la jj. 1880-1883 (li estis 20-jara). 3 jarojn li vivis en Afriko kiel transvestita judo.

Postrestis lin la ekscio: kiel distingi la veran kontraŭ la falsa (transvestita) arabo aŭ judo:

– jena estas orde kombita – la judo havas sian hararon taŭzita
– jena havas kalojn sur la plandoj, kio sin malkovras en banejoj; araboj, kiuj surhavas sandalojn, kalojn ne havas

– jena pisas starante, arabo pisas kaŭrante

De Vráz ni ekscias, ke en Ĝibraltaro, sur signalturo, servis certa familio Gumbert, kies radikoj estis en nia lando.

La nomo de la vojaĝisto supozigas, ke li ne estis ĉeĥo (eble bulgaro), sed lia koro estis al nia lando devota. En Papua Nova Gvineo li nomis montaron omaĝe al Bedřich Smetana. Dum sia travojaĝo de Afriko li kolektis multan etnografian materialon, sed nur kelka troviĝas en Prago, la urbo ne havis sufiĉe da financoj por alveturigi ĉion. Do oni povas tion vidi en Dublino, Vieno, Londono… Alte taksitaj estas liaj fotografaĵoj (pioniro de vojaĝ-fotografistoj). El Tajlando li alprenis fiŝeton – la unuan por hobio-akvarioj (Beta Splendens). Li mortis en 1932 en Prago. 71-jara.

Ni daŭrigu kun „niaj spuroj en Maroko“ per jenaj informoj: la kontaktoj inter niaj landoj disvolviĝis ĝis la jaro 1906. En la merkat-amplekso ni staris sur la ŝtupo 2 (post la Francio) – precipe en la eksporto de sukeraj konus-trunkoj (kiuj poste transformiĝis je kubetoj). Francio poste baldaŭ okupas la landon, en ĉiuj sferoj okazas stagnado; la progreso komenciĝas denove en la 1930-aj jaroj.

Sian viglecon montris nialandaj entreprenistoj, la fama Baťa, kiu tie instalis 36 filiojn. La komerc-domoj Nehera kaj Rolný konstruigis fabrikojn por ŝuoj. Daŭris ankaŭ la „sukera merkato.“ En la jaro 1935 estis en Maroko instalita konsulejo.

En la jaro 1930 veturis en Maroko-n „Rapid Vinohrady“ kaj postlasis tie tiom fortan efikon, ke en la lando estis estigita la futbal-teamo „ĈEĤOJ“.

**Parto dua**

Nun eniras en la artikolon mi mem, esperante, ke nian legantaron interesos ankaŭ miaj „spuroj en Afriko“… Ankaŭ mi surpaŝis Afrikon unue en Maroko. En la j. 2004…

En la j. 1983 mi partoprenis la „Afrikan simpozion“, en la urbo Holice. Allogis min la ĉefa temo: Albert Schweitzer – la Granda doktoro. (Tiuj simpozioj estis organizitaj ĉiun duan jaron; pri A.S. tiam parolis „la tuta mondo).“ La dua allogo estis: la evento okazis en la Memorejo de Emil Holub – kie la urbo Holice omaĝis sian naskiĝinton, la grandiozan vojaĝanton tra Afriko. Por honoro de organizantoj ni nomu almenaŭ la elstaran geografon Ctibor Votrubec. El multaj prezentantoj de la evento mi elektis la homon sidantan „en la unua vico.“ Pro la koncerna temo kaj programo.

Tio estis dr. Radim Kalfus. Li ja estadis en la malsanulejo en Lambaréné en Gabono. Li skribis pri tio libron GRANDA DOKTORO.

Tio estis lasta vizito de R.K. en la simpozio. Jam en la j. 1985 li mortís (pro kor-kolapso).

En la j. 2006, kiam mi „trempis“ miajn piedojn en la malprofunda golfo de la riverego Zambezi, super la Viktoria-akvofaloj, mi konsciiĝis, ke ni estas en teritorio, kiu estas ligita kun la nomo David Livingstone. Kaj Emil Holub…

Vere – mi trairis negrandan fago-boskon kaj staris antaŭ malgranda trajnostacieto (similis al iu bohemia loka haltejo). Naivulo, mi „gapis“, ke en la vepra sovaĝejo (*bush*) iras reloj (ne estis en la veprejo, ili apudis la urbon Livingstone).

Eble tiuj ne estis el la tempo de E.H., sed – pli granda la surprizo: sur la muroj de tiu halto-stacidometo estis lokitaj fotografaĵoj de la Emil-Holub ekspedicio! Tio ne aspektis kiel oficiala ekspozicio… Tamen surprizo. Mi esperis la aferon ĝui en la muzeo de la urbo Livingstone, sur kies katastro parkis nia buso. En la enirspaco mi ekvidis postamenton kun la busto de Emil Holub (ĝin prizorgis nia registaro). En la muzeo estis kompreneble multaj aĵoj koncernantaj Afrikon; sed ĉiuj estis NUR el la trovoj de David Livinstone, NENIU el la ekspedicio de Emil Holub! Neniu marko pri li! Tamen: ĉe la kaso unusola polvita fotografaĵo – ĝuste de tiu skulptaĵo, kiu staras sur la korto. Do – mi ŝtelis ĝin.

Ĉar la fama E.H. ne bezonas populariĝon, mi revenas al dr. Radim Kalfus

(Enirvortoj de Ctibor Votrubec: Rememoroj pri Granda Doktoro A.S.)

„Aŭtoro de la rimarkebla libro – dr. Radim Kalfus – estis bona amiko de Albert Schweitzer, tial li kapablis pri li skribi tiel alloge. En la jaroj 1960-66 li estis 4-foje ĉe A.S. en Lambaréné.

Kune ni organizis la simpoziojn pri Albert Schweitzer en Holice, kaj pri li ni parolis ankaŭ en radio-elsendo.

Radim Kalfus naskiĝis en Liberec – Růžodol, en la j. 1920. Lia patro tie estis direktoro de ĉeĥa mezlernejo. Poste la familio translokiĝis en Prago-n (Hanspaulka). En sia junaĝo estis Radim ravita de la libro „Homoj en praarbaro“ (Lidé v pralese) de A.S. Li studis en la jurista fakultato de la Karol-universitato, kie li estis tre aktiva delegito ĉe la funebro de Jan Opletal. Por fuĝi el la atento de nazioj, li devis sin kaŝi ekster Prago. Pro sia patriota braveco li estis alvokita esti pastoro de la Unuiĝo de Ĉeĥa Frataro (Jednota Bratrská), en Ústí nad Orlicí. Li ŝatis muzikon kaj sian patrujon. Tial li en la regiono organizadis koncertojn de Ĉeĥa Filharmonio (dirig. Václav Talich), kiuj fariĝis manifestoj kontraŭ nazia okupo de nia lando. Poste li translokiĝis al Liberec kaj laboris plu kiel pastoro.

Pro sia funkcio, delegito de la ministerio (edukado, kulturo), en la jj 1957-69, li faris 13 vojaĝojn en diversaj landoj (ekz. en la Betlehem-universitato, Usono, li ĉeestis malkovron de la busto de Komenio okaze de la 400-a datreveno de lia naskiĝo), kiel delegito de Ruĝa Kruco li flugis al Lambaréné (Gabono), kie li transdonis medikamentojn kaj sanbezonaĵojn (same, kiel en ĉiuj landoj en Afriko, Azio) kiel donacon de nia registaro. Albert Schweitzer akceptis lin tre sincere, ili fariĝis amikoj. Li invitis R.K. al sia 90-a naskiĝ-ceremonio en Lambaréné, kie li mem servis por la homaro 50 jarojn! Radim Kalfus proponis por la hospitalo la ĉeĥan doktoron Jaroslav Sedláček, kies kurac-servo estas plua merito de niaj samlandanoj en Ariko.“

Radim Kalfus pri Albert Schweitzer:

„Li memorigis al mi, ke la profundan feliĉon mi povas senti nur en solidareco kun la vivo de aliaj homoj. Li memorigis al mi, ke ne sufiĉas la mondon priskribi, kompreni – sed precipe klopodi por ĝia plibonigo.“

Filozofio, kiun Albert Schweitzer vivis, nomiĝas „Estimo al la Vivo“. En ties etiko li – kiel la unua famulo – elstaris kontraŭ la atom-armiloj kaj por plena senarmigo.

En la j. 1952 li estis honorita per la Nobel-Premio pri la paco.

*Aŭgusto 2025* *Margit Turková*

# Jihlava

En Jihlava esperantistoj jam 12 jarojn gvidas societon Esperas, kiu strebas helpi al infanoj en Benino per vestaĵoj, skribiloj kaj ludiloj.



Se vi interesiĝas, vizitu la retejon https://www.facebook.com/esperaszs aŭ skribu al Esperas@post.cz aŭ telefonu 737 074 649 .

# Eksaj tendaranoj en Lančov




vizitis la kastelon Vranov. Ĉi-jare ni havis ankaŭ afrikan gaston Kokou Sagbadjelou, kiu venis post partopreno en UK ankaŭ al nia tendaro. Li estis ĉi tie jam antaŭ preskaŭ 30 jaroj post la Praga UK en 1996 kaj en 1999 post la Berlina UK. Venontjare la renkontiĝo okazos 14 – 16 aŭgusto 2026.

# Prostějov




Sabate la 28-an de junio 2025 kunvenis membroj de iama 9-a skolta grupo *Jestřábi* (Akcipitroj) laboranta sub la esperantista klubo Prostějov. Ili tra-rigardis klubejon, kronikon de la 9-a skolta grupo kaj projekciis fotojn re-memorante sian skoltan vivon.

# Mladá Boleslav

La regulaj kunvenoj ne plu en rekontruata Klementinka, sed en Žižka-kazerno (flegserva domo) en la strato Havlíčkova apud teknika mezlernejo ĉiun merkredon antaŭtagmeze 10-12 h.

# Brno



La 27-an de septembro 2025 atingas 70 jarojn nia membro Oldřich Arnošt Fischer, tre aktiva literature, eldonante siajn librojn proprakoste aŭ ĉe KAVA-PECH.



# Rezolucio de ILEI-kongreso

La 58-a Internacia Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunveninta en Beogrado (Serbio) de la 19-a ĝis la 26- a de julio 2025, dediĉis sian semajnon al la temo

„**Lingvolernado kaj Artefarita Intelekto**”.

Kadre de la kongreso okazis ankaŭ universitata ILEI-Simpozio sub la titolo

„**AI kaj Kulturo**”.

**Konsiderante ke:**

● Artefarita intelekto (AI) rapide transformas la metodojn de lingvolernado kaj instruado, kunportante novajn eblojn kaj defiojn;

● Esperanto, kiel planlingvo kun logika kaj regula strukturo, havas unikajn trajtojn kiuj povas bone kongrui kun AI-iloj por lernado kaj tradukado;

● Estas esence esplori kiel AI povas subteni kaj plibonigi la instruadon kaj disvastigon de Esperanto, samtempe konservante la kulturajn kaj interhomajn aspektojn de lingvolernado;

● La simpozio „AI kaj Kulturo” emfazis la gravecon de etikaj, sociaj kaj kulturaj konsideroj en la apliko de AI, ankaŭ en la kunteksto de tradukado kaj arta kreado;

**La Internacia Kongreso de ILEI rezolucias:**

● **Subteni esploradon kaj evoluigon de AI-rimedoj por Esperanto**: Instigi al evoluo de aplikaĵoj/apoj, platformoj kaj rimedoj bazitaj sur AI (ekz. babil-robotoj, virtualaj instruistoj, gramatik-analiziloj kaj progresintaj neŭraj tradukiloj) por faciligi la lernadon, ekzercadon kaj uzadon de Esperanto.

● **Enkonduki AI en metodikon por instruado de Esperanto**: Esplori kaj kundividi bonajn praktikojn por la uzo de AI en lernado kaj instruado de Esperanto, rigardante ĝin kiel komplementan, ne anstataŭantan, al la homa interago kaj tradicia pedagogio.

● **Krei lernomaterialojn utiligantajn AI-teknologion**: Disvolvi kaj disvastigi novigajn edukrimedojn kiuj enplektas AI-teknologion por fari la lernadon de Esperanto pli interaktiva, tajlorita kaj efika.

● **Sentemigi onin pri etika kaj respondeca uzo de AI**: Stimuli kritikan pensadon pri la efikoj de AI en lingvolernado kaj kulturo, certigante ĝian uzon inkluzivan, justan kaj respektan al lingva kaj kultura diverseco.

● **Flegi kunlaboron inter esperantistoj kaj AI-fakuloj**: Instigi al interŝanĝo de scioj kaj spertoj inter la esperantista komunumo, esploristoj, sciencistoj kaj programistoj en la kampo de artefarita intelekto, por utiligi la sinergion inter Esperanto kaj novaj teknologioj.

● **Apogi la trejnadon de instruistoj pri AI**: Proponi daŭrajn trejnadojn por instruistoj de Esperanto, por ke ili povu efike kompreni kaj uzi AI-rimedojn en sia instruado.



*Prezento de IPR dum UK*

# Helpu helpi 2025

La 18-a de junio jam la 12-an fojon la membroj de la klubo E-mental' kunvenis en Prago 1 sur la strato Na příkopě por aktive partopreni en la tutŝtata bonfara projekto CIHLA (BRIKO), organizata ekde 1999 de la organizo Portus Praha.

Ĝia celo estas kolekti monon por subteni estigon de memstaraj loĝejoj kaj protektataj laborejoj por pli memstara kaj digna vivo de menshandikapuloj. Ĝis nun ĝi helpis al realigo de 64 projektoj en la tuta lando.



Esperantistoj (ne nur el Ĉeĥio) ĉi-jare kolektis 11.300 CZK, por kiuj ili ricevis 41 simbolajn brikojn, kiujn ili povis propramane ornami kaj ekspoziciigi surstrate sur la muro diskoniganta la projekton inter la publiko.



Kiel kutime la partoprenantoj propagandis Esperanton pentrante ĝian nomon aŭ vortojn en ĝi. La muron ofte fotas preterpasantaj turistoj kaj Esperanto tiel disflugas en la tutan mondon.

Jen unika maniero, kiel kunigi kreemon, amuzon kaj samtempe utilan aktivecon por bezonantoj.

Do krom *Kuro por Paraple* (subteno de paraplegiuloj) kaj *Bestoĝardeno* (adopto de animaloj) temas pri plua sukcesa kaj sencohava projekto, kiu povas nian movadon malfermi al la ekstera mondo kaj montri nian solidarecon kaj helpemon.




Bv. sekvi Kalendaron de aranĝoj en Esperanto.cz kaj sekvafoje vi ankaŭ povas partopreni (eĉ se nur virtuale sendante bezonatan monon, ĉu individue, ĉu nome de la klubo).




Dankon al la iniciatintino Vlasta Pištíková kaj al ĉiuj kontribuintoj!

*Pavla Dvořáková*

# Tři roky ve výboru

Před třemi roky mne Jirka Tomeček na jedné akci E-mentálu oslovil, jestli bych nechtěl kandidovat do výboru, že hledají člověka na web a elektronické záleži-tosti. Obojí mne zajímalo, tak jsem na víceméně ne příliš jasnou nabídku tehdy kývnul. Nyní se blíží konec volebního období, tak nabízím ohlédnutí za těmito tři roky - co se povedlo více a co méně.

**Organizace fungování výboru** - jedno z prvních setkání výboru jsme věnovali seznámení se a říct si, jaký způsob komunikace nám vyhovuje. Tehdy jsme se dohodli na online schůzce jednou za měsíc pomocí meet.jit.si, společnou e-mailovou adresu komitato@esperanto.cz a založili skupinu v aplikaci Signal. K schůzkám jsme po cca roce přidali i fyzické setkání 1x za půl roku - díky laskavé nabídce železničářů máme k dispozici jejich klubovnu na nádraží v Chocni.

**Google disk pro ČES** - pokud máte mobil s Androidem, máte k dispozici od Google i úložiště pro vaše data na jejich serverech o velikosti 15 GB. Takový prostor jsme chtěli i pro svaz, tak jsme zřídili soukromý účet u Google. Nedlouho na to jsme se dozvěděli, že Google má výhodnou nabídku účtu pro neziskové organizace - s místem až 100 TB, takže jsme tento účet zřídili. Využíváme jej pro zápisy z jednání - do jednoho dokumentu mohou zároveň psát více účastníků jednání a doplňovat potřebné informace - a to i z mobilu.

**Canva** - podobná věc se podařila s grafickým programem Canva - ten pomáhá při tvorbě plakátů, grafiky pro web či soc. sítě. Svaz má bezplatně k dispozici verzi s přístupem k jinak zpoplatněným funkcím a licence pro až 50 uživatelů, kteří mohou opět svou práci snadno sdílet s ostatními. Pokud vás grafika baví a chtěli byste svazu v něčem pomoci, kontaktujte mě.

**Mailchimp** (nástroj pro zasílání e-mailů **Retkomunikoj**) - od Mirka Hrušky jsem s jeho laskavou pomocí dostal přístup k účtu ČES v aplikaci MailChimp, který byl po jeho odchodu z výboru nevyužíván. Spou s Pavlou Dvořákovou jsme pročistili kontakty a v červenci 2024 opět začaly vycházet Retkomunikoj. Bohužel práce na soc. Sítích pro Světový kongres od podzimu 2024 sebrala kapacitu a Retkomunikoj musely stranou. Nyní (září 2025) opět vycházejí a informují jak vás - členy ČES, tak i další zájemce, kteří o ně projevili zájem. Pokud máte zájem je dostávat, zadejte svůj e-mail v tomto formuláři: https://mailchi.mp/ac06f926ebf0/mm-zjem-o-infomail-es

**Online kurz pro začátečníky** - díky připravenosti Milana Kolky, který měl hotovou osnovu kurzu pro začátečníky a byl ochoten jej vyzkoušet učit online, jsme mohli uskutečnit dva běhy. Na jaře 2025 jsme kvůli připravám Světového kongresu kurz nekonali. Ke kurzu jsme potřebovali vydat učebnici, což bylo možné i díky štědré finanční podpoře mnohých z vás - všem dárcům děkujeme!

Mgr. Josef Kalčík
kalcik@esperanto.cz
Kontakt na výbor:
komitato@esperanto.cz

*(pokračování v příštím čísle)*

# Surspure de doktoro Ludoviko – spontanea renkontiĝo landlime

Duszniki-Zdrój estas konata kuracloko en sudokcidenta Pollando tute proksime al la ĉeĥa landlimo (20 km oriente de Náchod). Ĝia specifa ĉarmo, kalmo kaj surprize forta pura aero, kiuj kaptis min jam antaŭ 11 jaroj, decidis, ke mi kun mia edzo Vladimír pasigis tie fine de ferioj unusemajnan ekskursan libertempon.

Pri la urbeto mi jam informis dum mia prelego kadre de la projekto *"Surspure de doktoro Zamenhof"*, ĉar ĝuste tie (en tiam nomita Bad Reinerz) en 1906 kaj 1909 kuracis sin d-ro Zamenhof antaŭ aŭ post la UKoj.



*Geedzoj Zamenhof kun sileziaj esperantistoj 22.8.1909*

Ĉar ni deziris revidi nian amikinon Teresa Pomorska, estrinon de la Silezia Esperanto-Asocio el Vroclavo, nepovintan veni al la UK, mi informis ŝin en aŭgusto pri nia restado.

Kaj tiel vekiĝis spontanea ideo provi okazigi (eĉ se last-momente) neformalan kameretosan landliman renkonton de ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj.

Mi alparolis precipe membrojn de la klubo E-mental' kaj esperantistojn loĝantajn en orienta Bohemio.



Fine venis el Prago niaj amikinoj Květa Krajíčková, Lucie Karešová kaj Jitka Tyšerová kaj el Vroclavo trajne kun Teresa entute 10-membra grupo. Dekomence regis amikeca kaj gaja etoso.

Ni ne nur ĝuis promenon tra la historia urbocentro kaj la banloko, sed jam dekomence kune kantis kun du ukuleloj. Surplace rimarkis nin posedanto de la loka antikvaĵ-vendejo, kiu sekve iris al la aŭto por sia akordeono, aliĝis al nia muzikumado kaj invitis al sia koncerto.



*Apud la kuracfonto Agata – teni sin kune je fingroj onidire portas feliĉon*

Sur la ronda placo ĉe la parka kuracpromenejo Teresa kun Georgo helpe de reproduktilo sonigis muzikon kaj instruis nin diverstradiciajn ronddancojn. Ekinteresiĝis ankaŭ preterpasantaj banlokaj gastoj.

*(daŭrigo en la sekva numero)*

# JUBILEANTOJ DE JULIO, AŬGUSTO KAJ SEPTEMBRO 2025

Ing. Josef Babka, Plzeň
Ing. Vladimír Dvořák, Písek
Bohuslav Dvořák, Pardubice
MVDr. Oldřich A. Fischer, Brno
Stanislav Franc, Pardubice
Mgr. Petr Hamajda, Nespeky
Jindřich Havlík, Praha
Ing. Jan Janoud, České Budějovice
Ing. Josef Krob, Kladno
Miroslava Marešová, Praha
Josef Mašek, Třebíč
Mgr. Václav Pospíšil Semily
František Szappancsik, Velké Svatoňovice
Miroslava Tomečková, České Budějovice
Libuše Trojanová, Brno
Blanka Vejšická, Březnice

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras firman sanon, kontenton kaj sukceson en la vivo!

# Martin Stuppnig centjara



Martin Stuppnig, mia plej proksima eksterlanda amiko, kiun mi nomas mia Esperanto-paĉjo, ĉar estas li, kiu paroligis min en Esperanto, bone konata al ĉeĥaj esperantistoj, solenas la centan naskiĝdatrevenon.

Li naskiĝis la 24-an de oktobro 1925 en malriĉa familio kiel unu el 14 infanoj. Pro sia natura helpemo li jam kiel junulo sukcese finis kurson de Ruĝa Kruco kaj ricevis diplomon de flegisto.

Sed lia infaneco, same kiel de liaj samaĝuloj, draste ŝanĝiĝis post la anekso de Aŭstrio fare de nazia Germanio. La 25-an de aŭgusto 1943 li, 17-jara junulo, estis rekrutita al *Wehrmacht* kaj post mallonga ekzercado li partoprenis unu el la plej kruelaj bataloj pri la kastelo Monte Cassino. Mi trasaltas la militajn travivaĵojn de Martin, ankaŭ la jarojn de liaj aventuroj en la brita militkaptejo en Afriko. La interesiĝantoj povas konatiĝi kun tiu parto de lia juna vivo en lia libro *Home en senhomeco*, aŭ en la ĉeĥa traduko *Vždy lze zůstat člověkem*.



Subskribado de la libro *Home en senhomeco*

La tutan aktivan vivon Martin restis fidela al fervojo kaj post konatiĝo kun Esperanto ankaŭ al Esperanto, al kiu li fidelas ĝis nun. En fervoja orkestro, kiun li fondis post la reveno el la milito, li ludis saksofonon kaj klarneton, ĝis kiam la kuracistoj malpermesis tion al li pro gorĝomalsano.

En Esperanto li agadis enlande ene de AFEF (Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio) kaj internacie ene de IFEF, kies honora membro li estas ekde la jaro 2008.

Martin estis vigla vojaĝanto kaj vizitadis regule ne nur la fervojistajn kongresojn, sed ankaŭ aliajn Esperanto-aranĝojn, preskaŭ ĉiujare ankaŭ iujn en Ĉeĥio. Krome, li estis ĉe la fondo de trilanda renkontiĝo (Aŭstrio, Italio, Slovenio, kiu ŝanĝis sian nomon en 2008 al Trilanda konferenco). Enkadre de ĝi oni tradicie supreniris al la pinto de la monto Dreiländereck-Offen / Peč / Monte Forno, la komuna punkto de ĉiuj tri landoj. Cetere, ĝin dufoje partoprenis ankaŭ Jindřich Tomíšek.



Li multe aktivis ankaŭ en sindikatoj, estis dudek jarojn regiona prezidanto kaj nun li estas regiona honorprezidanto. Krome li aktivis ankaŭ politike; kiel socialdemokrato li plenumis diversajn funkciojn pro kio li estis honorigita per la signo „*La blanka rozo de Arnoldstein*“.

Mi finu la rakonton pri Martin Stuppnig per liaj kredoj, esprimitaj fine de la aldonita ĉapitro en la dua germana, la ĉeĥa kaj la tria esperanta eldonoj de lia verko, nomata *Pri poste*:

*Ĉiu homo mem respondecas pri sia vivo.*
*Moviĝo estas vivo kaj klereco estas potenco.*
*Kredi al Dio kaj vivi humane!*

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

# Jindřiška Dubinová

(1950 – 2025)

nomata Inka Dubinová, forpasis la 21-an de junio 2025. Ŝi laboris en hospitalo de Svitavy, esperantistiĝis en kurso kaj aktive helpis organizi regionajn renkontiĝojn. Kiam ŝi transloĝiĝis al Poděbrady, ŝi laboris en loka klubo. Multe ŝi helpis al blinduloj kiel akompanantino, precipe dum ekskursoj al Aŭstrio, ĉar ŝi bone sciis la germanan. Tie ŝi trovis amikon Christian Gierlinger. La scipovon de la germana ŝi utiligis kuntradukante (kun Karel Kauer) el la germana originalo la libron de Martin Stuppnig „Home en senhomeco“ (ĉeĥe: Vždy lze zůstat člověkem) kaj interpretante lian rakontadon en Mahen-biblioteko de Brno en 2019, kiam en Brno okazis la asocia kongreso. De tiu aranĝo devenas nia foto.



Brno 2019, Mahen-biblioteko. Martin Stuppnig rakontas germane pri sia libro *Home en senhomeco* kaj Jindřiška interpretas.

# Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**06946** konference/sjezd ČES
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
**51100** sekce katol. esp. IKUE, **ZMĚNA!**
vlastní b. ú. 1647837113/0800
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Libroj de Eduard Petiška




Mitoj de antikva Izraelo

Mitoj de Egiptio kaj Mezopotamio
kiel videolibro.

Plie:





Prelego pri trampa movado
Kompilita Arta programo de UK 2025

Ĉion preparis Vladimír Türk.

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**56. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku**
**(bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,**
svubova@esperanto.cz

**Uzávěrka příštího čísla**: 15.11.2025

-----------------------------------------
-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 56-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.11.2025

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopajn prelegojn sekvu en Eventaservo.org kaj Kalendaro de Esperanto.cz.

# 2025

**2025-09-22/24** Fervojista konferenco en Ramzová, info: http://ifef.wz.cz/

**2025-10-17/19 ĈEA-kongreso en Havířov**

La kongreso okazos en pensiono **Jaškovská krčma.** La restoracia teraso proponas belan vidon je val-baraĵo Těrlice kaj la ĉirkaŭaĵo belegajn lokojn por promenado.

# Předplatné časopisů

**Hledáme nového zprostředkovatele**, protože Pavel Polnický tuto činnost ukončil. Do příštího čísla bude situace vyřešena. Jedná se o časopisy Monato, Juna Amiko, Literatura Foiro a La Ondo de Esperanto, objednávané koncem roku.

# Co dělá výbor?

■ Svazový výbor byl hlavně zaměstnán přípravou Světového kongresu v Brně a zajišťováním jeho zdárného průběhu
■ Takřka současně s kongresem se výbor musel zabývat i přípravou svazového volebního sjezdu v Havířově – ubytování, stravování, přednáškový program, příprava přihlášky
■ O své činnosti informoval členskou základnu nejen ve Startu, ale také rozesíláním ĈEA Retkomunikoj po internetu a na svazové stránce www.esperanto.cz



*UK-ekskurso al nia muzeo en Svitavy*



*Uk-teatraĵo Lampiroj laŭ Jan Karafiát de teatro DOMA Svitavy*



*UK-ekskurso al Pálava*




*Martin Sedlák instruis la ĉeĥan dum UK*




*Ne mankis infana kaj adoleska kongreseto*



*La organizantoj kaj helpantoj adiaŭas la kongreson*